

Verkita je 05.09.2022

La oriento de Kongo-Kinŝaso estas en senĉesa malsekureco ekde 1996, en tiu landparto de DR Kongo la paco tute malaperis- kaj la popolanoj daŭre travivas koŝmaron de ĉia malsekureco far diversaj fiuloj: M23, CADECO, ADF NALU, ...

Mi volas malpli detale paroli pri la malsekureco en Rutshuru kie troveblas plurajn ribelaj grupetoj.

En 2008, en Norda Kivuo leviĝis ribela grupo, nome CNDP de kolonelo Laŭrento Nkunda. Ĝi sukcesis konkuri politike kelkajn teritoriojn: Rutshuru, Masisi kaj eĉ la Nordkivuan Ĉefurbon Goma. En 2010, ili estis miksitaj kun FARDC, konga armeo. Okazis interkonsentoj tiam inter tiu ribela movado kaj la konga registaro pri kiuj kongolandanoj ignoras, malobservo de tiuj interkonsentoj naskis M23, tio estas CNDP, alinome... tiam multaj civiluloj mortis!

En 2022, M23 levis sin kontraŭ la registaro en vilaĝoj Runyoni kaj Ĉanzu de Jomba, en Rutshuru. La milito akriĝis ĝis Bunagana, landlima urbeto de Kongo falis en la manojn de la ribeluloj M23, la 13-an de junio 2022. Ĉiuj loĝantoj fuĝis, jen al Kiwanja, jen al Goma, sed la plejmulto transiris al Ugando. Notindas ke en tiu lando estas kampadejoj en kiuj loĝas senombraj kongolandanoj rifuĝintaj antaŭ multaj jaroj, temas ĉefe pri kampadejoj; Nyakabande, Rwamwanja, Nakivale, Ĉaka, Ĉankwale... Mi mem estis rifuĝinto en Nyakabande, kaj poste en Rwamwanja en 2013!

La konga registaro alvokis plurajn fojojn al porpaca dialogo kun M23 en Nairobi, Kenjo kun vana rezulto, poste klare montriĝis ke Ruando kunlabore kun Ugando subtenas la ribelulojn M23.

Nune la registaro de Ugando forpelas la kompatindajn rifuĝintojn kiuj ne volis iri al la supre menciitaj kampadejoj. Ekde la 1-a de septembro Ŝarĝaŭtoj (de la marko Fuso) revenigas rifuĝintojn al Rutshuru, tra Kitagoma, la vojo de Bunagana ne plu estas trairebla! La nova enlanda kampadejo situas 4 kilometrojn for de la urbeto Kiwanja kie mi loĝas!

La familio de la esperantisto Jonathan Ndayishimiye, estro de Bunagana Esperanto Amikaro familio atingis tiun novan enlandan kampadejon sabate, la 3an de septembro. La tendoj estas malsufiĉaj, kelkaj tranoktas ekstere!

Tiuj kiuj antaŭe fuĝis al Rutshuru-centro kaj Kiwanja, tranoktadis en klasĉambroj de lernejoj. Ekde la 5an de septembro 2022 la lerneja jaro komenciĝis, ili ne scias kien iri.

Kiam estas malpaco, homoj vivacas, kaj nur povas esperi ke revenos la paco.

Joel Muhire.

